

LA AKUZATIVO KAJ LA DIREKTA N

ĈE LOKAJ ADVERBOJ EN ESPERANTO

(W.A.V. Themaat, AMSTERDAM, Nederlando)^{&/}

En "Fleksio, derivado kaj paradigma morfologio" mi asertis pri la direkta *n* ĉe lokaj adverboj du aferojn:

1/ La direkta *n* ĉe adverboj estas *deriva* morfemo, dum la akuzativa *n* ĉe substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj estas *fleksia* morfemo.

2/ En formaligita gramatiko la akuzativa *n* ĉe substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj kaj la direkta *n* ĉe adverboj estas traktendaj aparte.

Nogueira atakas ambaŭ konkludojn, pro kio li donas du specojn de argumentoj. La argumentoj la kaj 5a pli atakas la apartan traktendecon de la direkta *n* ĉe adverboj; la argumentoj 2a, 3a kaj 4a pli ĝian derivan karakteron. Lia tuta argumentaro min instigis denove pripensi la rilaton inter la akuzativa *n* ĉe substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj kaj la direkta *n* ĉe adverboj.

1/ La sameco de signifo de la direkta *n* ĉe substantivoj kaj adverboj. Sed tiun samecon mi ne neis. La signifo ne estas kriterio por la stato de morfemo: fleksia morfemo, deriva morfemo aŭ sendependa vorto.

^{&/} D-ro pri matematikaj sciencoj. Vondelstraat 62b, AMSTERDAM-1013

La sama signifo povas esti esprimata en la sama lingvo per fleksia finaĵo kaj per sendependa vorto, ekz. "Mi iras Romon" kaj "Mi iras al Romo". Lia cito de Martinet pruvas nenion, ĉar Martinet almenaŭ en la citita libro ne okupiĝas pri la distingo de fleksio kaj derivado.

5/ La pli granda simpleco de malsamaj analizoj de lingva fenomeno (ĉi tie la akuzativo ĉe substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj kaj la direkta n ĉe adverboj) povas esti diskutata nur en la kadro de ĝenera gramatiko, kiu ideale generas ĉiujn gramatikajn frazojn de lingvo, kaj nur ilin, kaj priskribas ilian signifon (vidu ekzemple Chomsky 1965 kaj Katz-Postal).

&
& &

Ekzistas du ĉefaj skoloj en la ĝenera gramatiko: la ĝenera sintakso, defendata i.a. de Chomsky kaj Katz, kaj la ĝenera semantiko, defendata i.a. de Lakoff kaj MacCawley.

En la ĝenera sintakso la priskribo de la lingvo konsistas el kvar partoj: la baza komponento, kiu generas la t.n. profundan sintaksan strukturon, la transformo komponento, kiu generas la t.n. supraĵan strukturon el la profunda strukturo, la fonologia komponento, kiu generas la fonologian reprezenton el la supraĵa strukturo kaj la semantika komponento, kiu generas la semantikan reprezenton el la profunda sintaksa strukturo.

Ekz. laŭ Chomsky, Syntactic Structures, unue estas generata aktiva frazo kaj poste la pasiva frazo estas generata per transformo de la respondanta aktiva frazo, ekz. unue estas generata la frazo

Petro batas Paŭlon

kaj poste la frazo

Paŭlo estas batata de Petro.

Fakte la afero estas pli komplika. La pasiva frazo estas generata ne el la aktiva frazo, sed el abstrakta strukturo iom simila al la aktiva frazo, kaj ankaŭ tiu derivado estis atakita; ĉiujn detalojn ni ne povas pritrakti ĉi tie.

En la ĝenera semantiko la profunda sintaksa strukturo mankas. En la baza komponento estas generata la semantika reprezento kaj la transformo komponento transformas tiun semantikan reprezenton en supraĵan strukturon kaj fine denove la fonologia komponento la supraĵan strukturon en fonologian reprezenton.

La preferindeco de tiuj du tipoj de ĝenera gramatiko estas multe diskutita de la lingvistoj kaj ankoraŭ ne tute decidita. En ĉi tiu ar-

tikolo mi ne povas unue pruvi la superecon de unu el tiu du tipoj de genera gramatiko kaj surbaze de tiu pruvo analizi la akuzativon kaj la direktan *n* ĉe adverboj en Esperanto. Tamen en la sekvo mi metos min sur la vidpunkton de la genera semantiko, pro du motivoj:

1/ La plimulto de la lingvistoj nun ŝajnas preferi la generan semantikon.

2/ Nogueira pruvis siajn du tezojn: ke la akuzativa *n* ĉe substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj kaj la direkta *n* ĉe adverboj estas unu morfemo, kaj ke la direkta *n* ĉe adverboj estas fleksia morfemo, parte per la *semantika* simileco de la direkta akuzativo ĉe neadverboj kaj la direkta *n* ĉe adverboj. Do la genera semantiko, en kiu la semantika reprezento unue estas generata, plej favoras liajn tezojn. Se unu elliaj tezoj ne estas ĝusta el la vidpunkto de la genera semantiko, ĝi certe ne estas ĝusta el la vidpunkto de la genera sintakso.

&
& &

Kalocsay-Waringhien kaj Waringhien distingas tri specojn de akuzativo: la *objektan akuzativon*, la *adjektan akuzativon* kaj la *direktan akuzativon* (la direktan *n* ĉe adverboj ili konsideras kiel akuzativon). La *adjektan akuzativon* mi ne plu pritraktos.

En la malnovaj hindeŭropaj lingvoj *historie* la objekta akuzativo evoluis el la direkta akuzativo. En kelkaj kazoj tio estas videbla: em "Mi frapas muŝon" *muŝon* estas interpretebla kiel la direkto de la frap-movo. Sed ekzistas ankaŭ kazoj, en kiuj objekta akuzativo ne estas interpretebla kiel direkta akuzativo. Ekz. "La kaptito eskapis la prizono" havas ĝuste la malan signifon ol se *prizonon* estus direkta akuzativo. Kiel la objekta akuzativo estu prezentita en la semantika reprezento, mi ne pritraktos (ankaŭ la semantikan reprezenton de la rekta objekto la lingvistoj multe diskutas, vidu ekz. "The case for case"), sed ankaŭ la direkta akuzativo kaj la objekta akuzativo estas traktendaj aparte en la semantika reprezento.

Restas esplorenda do nur la rilato inter la direkta akuzativo ĉe substantivoj, adjektivoj kaj pronomoj kaj la direkta *n* ĉe adverboj. Nogueira pravas, ke la rolo de la *n* (li diras: la akuzativo, kio ĝuste estas pruvenda) estas esence la sama ĉe adverboj kaj neadverboj. Tio signifas ke ĝi havas la saman semantikan reprezenton. Nogueira pretendas por sia priskribo pli grandan simplecon kaj homogenecon. En la terminologio de la genera gramatiko li dirus, ke mi per mia priskribo "perdas

ĝeneraligon": la evidentan samecon de signifo de la direkta akuzativo ĉe neadverboj kaj la direkta *n* ĉe adverboj. Sed se oni donas al ambaŭ la saman semantikan reprezenton, tio ne okazas.

Sed la sameco de semantika reprezento tute ne implicas, ke en ambaŭ kazoj ĝi estas kaza finaĵo. Ĉar la kazo, kiel ĉiuj morfosintaksaj kategorioj, estas kategorio de relative supraĵa strukturo de la lingvo. Por decidi, ĉu la direkta *n* de adverboj estas kaza finaĵo, oni devas esplori, ĉu ĝi obeas la samajn regulojn de morfologio kaj supraĵa sintakso kiel la akuzativo ĉe neadverboj. Kaj kiel mi jam indikis en "Fleksio, derivado kaj paradigma morfologio", ili obeas tute malsamajn regulojn de morfologio kaj supraĵa sintakso.

Mia ĉefa argumento estas bazita sur la kriterio de la sintaksa diferencigo (vidu mian antaŭan artikolon), la ĉefa kriterio pri kiu Nogueira kaj mi konsentas. Tio sola devus sufiĉi. Tiun argumenton Nogueira klopodas malpruvi per la argumento, ke direktaĵaj adverboj ne povas esti determinataj de alispecaj vortoj. Sed direktaĵajn adverbojn ja povas determini aliaj adverboj, ekz. "La birdo flugas malproksime supren", kaj tiam la determinanta adverbo almenaŭ ne *deviĝe* alprenas *n-on* kiel oni devus atendi, se la *n* en *supren* estus fleksia morfemo (komparu la akordon de substantivoj kaj adjektivoj).

Unu argumenton ankoraŭ mi forgesis menci: fleksia morfemo donas certan morfosintaksan econ ne nur al la vortformo formita per la aldono de la fleksia morfemo al alia kiel lasta (se ĝi estas sufikso; kiel unua, se ĝi estas prefikso) morfemo al alia konstituanto, sed ankaŭ al ĉiuj vortformoj formitaj per la posta aldono de aliaj morfemoj. Ekz. la plurala finaĵo *j* donas la morfosintaksan econ de pluralo ne nur al *domoj*, kie *j* estas aldonita kiel lasta morfemo al *domo*, sed ankaŭ al *domojn*, kie post la *j* ankoraŭ *n* estas aldonita. Se la direkta *n* de adverboj estus fleksia finaĵo, ĝi donus la morfosintaksan econ de akuzativo ne nur al *antaŭ-e-n*, sed ankaŭ al *antaŭ-e-n-a* kaj al *ĉiel-e-n-as* (Miĥalski, p. 38), kaj *antaŭ-e-n-a* havus samtempe du morfosintaksajn ecojn, nominativan kaj akuzativon, kiuj sin kontraŭdiras, kaj *ĉiel-e-n-as* havus la morfosintaksan econ de akuzativo, kvankam al ĝi, kiel finitiva verbo, la morfosintaksa kategorio de kazo estas tute fremda.

Tiujn paradoksojn oni evitas, se oni konsideras la direktan *n-on* de adverboj kiel derivan finaĵon, ne aldonantan al la vorto formita per ĝi certan morfosintaksan econ.

&
&

La libera loko de la objekto rilate al subjekto kaj predikato (pro la akuzativo) kaj de la adjektivo rilate al la substantivo faras preferinda por Esperanto generan gramatikon, kiu komenciĝas per senordaj aroj dividitaj en subarojn (vidu Staal). Ekz. ĉe Staal :

1/ Frazo → [NF, Verba Frazparto] (NF = Noma Frazparto)

2/ Verba Frazparto → [Predikato, NF] ,

en kiu la aro [A,B] ne havas vicordon, t.e. [A,B] ≠ [B,A]; la NF en 1/ estas la subjekto, la NF en 2/ estas la objekto; nur poste la senordaj aroj setas transformataj en ordajn vicojn de vortoj, kaj fine de fone-
moj; sen konsidero de la uzo de senordaj aroj, la analizon de Staal kritikis Matthews, kiu proponas almenaŭ por kelkaj lingvoj tridividi la frazon en subjekton, objekton kaj predikaton (p.135).

La meritojn de ĉi tiuj solvoj ni ne povas diskuti. En certa fazo de sia derivado Esperanta frazo kun subjekto, predikato kaj objekto ricevas reprezenton por senorda aro [Subjekto, Predikato, Objekto] ("Subjekto", "Predikato" kaj "Objekto" estas ne la reprezentoj de la frazelementoj mem, sed *indikoj* de tiuj reprezentoj). "Subjekto" kaj "Objekto" indikas la formojn, kiujn tiuj frazelementoj havas, se ili estus subjektoj + indeksoj "subjekto" kaj "objekto".

Do ekzemple la frazo

La granda homo vidas la domon ĉe la stratangulo

havas en tiu fazo la prezenton

[| *la granda homo* |_{subjekto} , *vidas* , | *la domo ĉe la stratangulo* |_{objekto}]

Poste estas aldonata indekso "nominativo" al la subjekto kaj indekso "akuzativo" al la objekto, do

[| *la granda homo* |_{nominativo} , *vidas* , | *la domo ĉe la stratangulo* |_{akuzativo}]

(tiu stadio estas necesa por povi priskribi akuzativojn objektajn, adjektajn kaj direktajn per la samaj reguloj). Kaj fine reguloj morfologiaj kaj sintaksaj, kiujn ni ne povas doni detale, specifas, ke en la akuzativa frazelemento la kerna substantivo, adjektivo aŭ pronomo kaj la adjektivoj kaj pronomoj determinantaj ĝin senpere ricevas la *n*, sed ne ekz. substantivoj ligitaj al ĝi per prepozicio (*stratangulo* en nia ekzemplo).

Nomaj frazelementoj akuzativaj obeas la samajn regulojn morfologiajn kaj sintaksajn, sendepende ĉu la akuzativo estas objekta, adjekta aŭ direkta. La kerno de noma frazelemento povas ankaŭ esti adverbo (de

kvanto), ekz. *multe da homoj*. Nu, la rimarkinda fakto estas, ke adverba kerno de noma frazelemento neniam ricevas *n*, ne nur *ne*, kiam tiu frazelemento estas akuzativa, sed eĉ ne kiam tiu frazelemento estas akuzativo direkta. Ekz. oni diras: *Mi venis en multe da domoj*, ne: *Mi venis en multen da domoj*. Do la regulo, ke la adverbo ricevu *n*, se ĝi staras en la akuzativo direkta, estas falsa. Do ne estas plisimpligo konsideri la direktan *n*-on eĉ adverboj kiel indikilon de akuzativo direkta.

Direkta akuzativo povas troviĝi en direkta adjekto aŭ direkta suplemento (ekz. *traduko en Esperanton*). Sed direkta suplemento mem kun substantivo, kiu povas esti nur substāntivigita verbo, povas origini nur per transformo de verbo kun direkta adjekto, ekz. *traduko en Esperanton* el frazo entenanta - *tradukas en Esperanton*.

&
& &

Do ni povas limigi nin al la direkta adjekto. Ĝi havas kiel bazan reprezenton

Loka adjekto \wedge direkto

("Loka adjekto" denove ne estas la reprezento mem, sed *indiko* de la reprezento). Direkta adjekto povas alpreni ankaŭ la formon *al* \wedge NF, sed tion mi nun ne plu pritraktos.

La loka djekto siavice povas havi la formon

prepozicio \wedge NF aŭ adverbo.

Tria formo de direkta adjekto estas la absoluta direkta akuzativo de substantivoj, ekz.

Mi veturas Hamburgon.

Sed ĉar *Hamburgo* ne povas funkcii kiel loka adjekto (oni ne povas diri: *Mi loĝas Hamburgo* anstataŭ *Mi loĝas en Hamburgo*), oni ne povas aldoni la morfemon "direkto" kun la sama signifo al la nuda substantivo kaj al substantivo + antaŭa prepozicio. Do ni elektas konsideri la klaŭzon

prepozicio \wedge NF \wedge direkto

kiel pli primaran kaj derivi la klaŭzon NF \wedge direkto el

en \wedge NF \wedge direkto

per forigo de en.

Se la akuzativa *n* estas unu liniara elemento en la fino de la norma frazparto, do

Mi venis en la domo ĉe la stratangulon
anstataŭ

Mi venis en la domon ĉe la stratangulo,
fakte estas granda plisimpligo konsideri la direktan akuzativon en nomaj frazoj kaj la direktan *n-on ĉe* adverboj kiel unu morfemon. Sed tiel ne nur ne estas, sed el tia reprezento oni ankaŭ ne povas derivi la korektan morfologian kaj sintaksan formon maksimume simple.

&
& &

HF estas ekspansiata:

(3) NF → { SF
Adjektiva Frazparto
Pronoma Frazparto
Numeralo
NF ^ Prepozicio ^ NF
NF ^ Subpropozicio

(4) SF(^Ak) → SF(^Ak) ^ Infinitiva Frazparto.

(Por esti preciza al la lasta regulo mi devus aldoni limigojn por indiki, ke infinitiva frazparto povas esti aldonita nur, se la substantivo, kiu estas la kerno de SF, estas agsubstantivo; striktasence frazparto kun la strukturo

SF ^ Infinitiva Frazparto

tute ne estas enkondukata per reskriba regulo, sed per transformo de frazo en kiu la verbo de kiu la kerna substantivo de SF estas agsubstantivo estas predikato, sed ĉion ĉi mi nun ne povas pritrakti).

(5) NF → { Kvanta adverbo ^ da ^ NF
SF
Adjektiva Frazparto
Pronoma Frazparto
Numeralo
(NF ^ Prepozicio ^ NF)
(NF ^ Subpropozicio)
(NF ^ (Konjunkcio) ^ NF)

(6) SF → (SF ^ Infinitiva Frazparto)
(la krampoj estas necesaj por povi aldoni la akuzativan *n-on* sur la ĝustan lokon).

- (7) SF → { Substantivo
[SF, Adjektiva Frazparto]
[SF, Adjektivpronomo]
[SF, Numeralo]
- (8) Adjektiva Frazparto → { Adjektivo
Adjektivo ^ (Konjunkcio) ^ Adjektiva Frazparto
Adjektivo ^ Adjektiva Frazparto
Adjektivo ^ Prepozicio ^ NF
Adjektivo ^ Infinitiva Frazparto
[Adjektiva Frazparto, Adjektivpronomo]
- (9) Pronoma Frazparto → Pronomo
Pronomo ^ Pronoma Frazparto
- (10) (Kvanta adverbo ^ da ^ NF) / Ak →

La reguloj por la aldono de *n* akuzativa estas:

- (11) (NF ^ Prepozicio ^ NF) ^ Ak → NF ^ Ak ^ Prepozicio ^ NF
 (12) (NF ^ Subprepozicio) ^ Ak → NF ^ Ak ^ Subprepozicio
 (13) (NF ^ Infinitiva Frazparto) ^ Ak → NF ^ Ak ^ Infinitiva Frazparto
 (14) (NF ^ (Konjunkcio) ^ NF) ^ Ak → NF ^ Ak ^ (Konjunkcio) ^ NF ^ Ak
 (15) Numeralo } /Ak →
 Kvanta adverbo ^ da ^ NF

Kaj nun la regulo por la fonetika reguligo de la akuzativo, se la direkta *n* ĉe adverboj estas konsiderata kiel akuzativa finaĵo:

- (16) Substantivo }
Adjektivo } /Ak → *n*
Pronomo }
Loka adverbo }

Do konsideri la direktan *n*-on ĉe adverboj kiel akuzativan finaĵon fakte plisimpligas la formaligitan gramatikon de Esperanto, se oni konsideras el la morfologio nur la fleksian morfologion.

&

& &

Sed la fleksia morfologio estas nur parto de la morfologio; necesas konsideri ankaŭ la derivan morfologion.

La derivaĵojn generas la *ŝintakso* kaj la (deriva) morfologio. La

sintakso estas necesa por ligi la vortformojn al ilia signifo (precipe en la ĝenera semantiko, kiun ni elektis kiel kadron), La sintakso ĝeneras la derivaĵojn (aŭ pli ĝuste vortgrupojn, kiuj ilin entenas) ofte el aliaj vortoj aŭ vortgrupoj, ekz. *patra amo* el *la patro amas* aŭ *amas la patro*. El tiu ekzemplo oni vidas, ke la transforma ĝenero povas esti necesa por klarigi duoblan signifon: jam la antikvaj Latinaj lingvistoj konis la diferencon inter *genitivo subjekta* kaj *genitivo objekta* (*amor patris* estas *ke la patro amas* aŭ *ke oni amas la patron*).

Ke la prezenca finaĵo *as de amas* ne lasas spurojn en *patra amo*, estas malpli grave: *patra amo* povus esti ĝenerita el reprezento, en kiu *am* estas karakterizita nur kiel predikato, sed ne laŭ verbotempo (ekzistas lingvoj sen verbotempoj, sed lingvo ne povas malhavi la distingon inter subjekto kaj objekto ne tute perdante sian klarecon).

Do, *patra amo* povas esti ĝenerita el [*am, patr*]_o aŭ el [*am, patron*]_o
 [*am, patr-o*]_o → [*am-o, patr-o-a*]
 [*am, patr-o-n*]_o → [*am-o, patr-o-n-a*]

Sed anstataŭe ni havas *patr-a am-o* en ambaŭ kazoj.

La sama validas por la akuzativo direkta:

Mi vojaĝ-as Rom-o-n

transformiĝas al

Mi-a Rom-a vojaĝ-o,

ne:

Mi-a Rom-o-n-a vojaĝ-o.

Kiel ni jam vidis, ankaŭ la tempa finaĵo de la verbo (se ĝi ĉeestis en pli profunda reprezento) malaperis antaŭ la *o* de *am-o*. Ankaŭ la plurala finaĵo *j* neniam troviĝas antaŭ karaktera finaĵo, ankaŭ kiam la signifo ĝin ŝajnus postuli:

La ludo de la knaboj

iĝas

La knaba ludo,

ne

La knab-o-j-a ludo.

Do ni havas tre ĝeneralajn regulojn:

Karakteraj finaĵoj malaperas antaŭ karakteraj finaĵoj aŭ deriva sufixo komenciĝanta per vokalo (esceptoj: *post-e-ul-o* kaj *viv-u-o*) kaj

Fleksia finaĵo, krom la infinitiva finaĵo *i* kaj la participaj finaĵoj, malaperas antaŭ vortradiko aŭ deriva afikso en la sama vorto.

Fleksiaj finaĵoj, krom la infinitiva *i* kaj la participaj finaĵoj, ankaŭ ne troviĝas interne de kunmetaĵoj (pli precize: sekvate de vortradikoj en la sama vorto): *ludo de la knaboj* iĝas *knaboludo*, ne *kna-bojludo*.

Tiu regulo ne estis ĉiam obeata en la Esperanta literaturo. Ekzemple ni trovas:

*Do, eĉ sen atestanto, per manoj-surmeto
Sur bruston, ŝi aldonis ŝirmon al robeto.*

(Mickiewicz, p. 5)

kaj la akuzativo *ŝin* troviĝas regule interne de kunmetaĵoj (*ŝindona, ŝinanonco* k.t.p.).

Sed *ŝin* povas esti traktata per speciala regulo kaj koncerne la ekzemplojn de Mickiewicz genera gramatiko de Esperanto havas kiel taskon generi la ĝeneralan uzadon, ne la specialaĵojn de kelkaj aŭtoroj. Do ni povas formuligi la du jenajn regulojn:

(17) *Fleksia finaĵo, krom la infinitiva finaĵo i kaj la participaj finaĵoj, malaperas antaŭ karakterata finaĵo, vortradiko aŭ deriva afikso en la sama vorto.*

(18) *Karakterata finaĵo malaperas antaŭ karakterata finaĵo aŭ deriva sufikso komenciĝanta per vokalo (escepto: post-e-ul-o).*

Se la direkta *n* ĉe adverboj estus fleksia finaĵo kaj kondukus laŭ tiuj reguloj, tiam

Mi vojaĝ-as hejm-e-n

transformiĝus al

Mia hejm-a vojaĝ-o

anstataŭ al

Mi-a hejm-e-n-a vojaĝ-o.

Morfologie la direkta *n* ĉe adverboj kondukas ankaŭ ne tute kiel la aliaj derivaĵoj sufiksoj, ĉar tiam (se ni forstrekas la klaŭzon *komenciĝanta per vokalo*) antaŭ ĝi devus malaperi la karakterata finaĵo *e*. Sed tiu diferenco estas klarigebla el la fakto, ke la direkta *n* komenciĝas per konsonanto (en Esperanto ekzistas pluraj ekzemploj de karakteraj finaĵoj sekvataj de aliaj vortradikoj).

Sub la supozo, ke la direkta *n* ĉe adverboj estas fleksia finaĵo, *hejm-a vojaĝ-o* kaj *hejm-e-vetur-o* oni generas unue aplikante la regulon 17an kaj (por *hejm-a vojaĝ-o*) poste aplikante la regulon 15an.

En regulo 18a la klaŭzo *komenciĝanta per vokalo* povas malaperi;

do la du reguloj iĝas:

(17a) *Fleksia finaĵo, krom la infinitiva finaĵo i, la participaj finaĵoj kaj la akuzativa finaĵo n post la adverba finaĵo e, malaperas antaŭ karaktera finaĵo, vortradiko aŭ deriva afikso en la sama vorto.*

(18a) *Karakteraj finaĵoj malaperas antaŭ karakteraj finaĵoj aŭ deriva sufikso (escepto: post-e-ul-o).*

Do la regulo 17a eĉ plisimpliĝas, dum la regulo 18a iom malplisimpliĝas kaj la regulo 16 plisimpliĝas.

&

& &

Oni devas formuligi la gramatikon por decidi, kiu gramatiko entute estas pli simpla. La regulojn apartenantajn al la gramatiko konsiderantan la direktan n-on ĉe adverboj kiel derivan - mi indikas per d kaj la regulojn apartenantajn al la gramatiko konsideranta la direktan n-on ĉe adverboj kiel fleksian - per f. Tiam la diferencantaj reguloj (ordigitaj tiel ke al ĉiu reprezento estas aplikata la unua regulo aplikebla) estas:

d

(1) Loka adverbo/Direkto → n

(2) Direkto → Ak

(17) Ff → / Vr

A

Kf

(18) Kf → / A

Kf

(19) Substantivo }
Adjektivo } / Ak → n
Pronomo }

(34 simboloj)

kie:

A - Afikso

Ak - Akuzativo

Ff - Fleksia finaĵo

Kf - Karaktera finaĵo

Vr - Vortradiko

f

(1) Direkto → Ak

(16) Loka Adverbo/ Ak → n

(17) Ff → / Vr

A

Kf

(18) Kf → / A

Kf

(19) Substantivo }
Adjektivo } / Ak → n
Pronomo }

(34 simboloj)

La reguloj 16f kaj 19f devas esti distingataj, ĉar dum Ak kiel sintaksa reprezento havas la econ Ff, n, kiel fonetika reprezento, ĝin ne havas, kaj regulo 17f al ĝi do ne aplikiĝas.

Do laŭ simpleco la du gramatikoj ne estas distingeblaj: la diferenco kuŝas simple en 1d kontraŭ 16f kaj iom alia vicordo. Do la kriterio de la sintaksa diferencigo decidus, ke la direkta n ĉe adverboj estas deriva morfemo.

L I T E R A T U R O

- Chomsky, N., *Syntactic Structures*, Hago 1957
Aspects of the Theory of Syntax, Cambridge, Massachusetts, 1965
- Kalocsay, K. — Waringhien, G., *Plena Gramatiko de Esperanto*, 3a eldono, I kaj II, Milano, 1958 kaj 1964
- Katz, N. — Postal, P.M., *An integrated theory of linguistic description*, Cambridge, Massachusetts, 1964
- Martinet, A., *A Functional View of Language*, Oxford 1962
- Matthews, P.H., *Review of Chomsky's "Aspects of the Theory of Syntax"*, *Janua Linguarum*, 1966, Vol. 3, No. 1
- Mickiewicz, A., *Sinjoro Tadeo*, tradukita de A. Grabowski, 2a eldono, Varsovio 1955
- Mihalski, E., *Prologo*, Leipzig 1929
- Nogueira, R.P., *La fleksia sistemo de Esperanto*, *Scienca Revuo*, vol. 25 n-ro 2/3, 20-5-1974
- Staal, J.F., *Word-order in Sanskrit and universal grammar*, Dordrecht (Nederlando) 1967
- Verloren van Themast, W.A., *Fleksio, derivado kaj paradigma morfologio*, *Scienca Revuo*, vol. 23, n-ro 4, 20-9-1972
- Waringhien, G., *Lingvo kaj vivo*, La Laguna 1959